

Kodado en “La kato en la sako” de Mason Stuttard

Enkonduko

Mason Stuttard (1903–1983) estas ĉefe konata pro sia lernolibro por anglalingvanoj, sed li verkis ankaŭ novelaron, ne tre atentitan: *La virineto en bluo kaj aliaj rakontoj* (1946). En ĝi aperas la ero “La kato en la sako”, kiun mi analizos tra prismo, kiu enkadriĝas en la t.n. *kviraj studoj* (angle *queer studies*). Mia celo estas ĵeti lumon sur ankoraŭ ne tre esploritan kampon de la esperanta beletro. Samtempe kun tio, sin trudas ankaŭ esplorado pri la vivo de la aŭtoro, ĉar pri li mankas informoj en fakaj libroj kaj en interreto. En la paĝaro de la Biblioteko Butler legeblas: “Do ankoraŭ mankas, ke iu kompletigu la biografion de 1903 ĝis 1945; kaj precipe respondi kial li iris al Jugoslavio. Mi lasas al aliaj kolegoj tiun detektivadon” (Mason Stuttard [rete]).

1. La aŭtoro kaj la verko

Mason Stuttard naskiĝis la 30an de januaro 1903 en Burnley (General Register Office [GRO] 1983, *National Register* [NR] 1939), urbo en Lancashire, centra Anglio, kun teksejoj fonditaj dum la industria revolucio. Li estis filo de John Stuttard kaj Sarah Ann Stuttard, naskita Whitaker en 1862 (NR 1939), kiuj edziĝis en 1893 kaj havis kvin filojn, el kiuj unu forpasis. La geedzoj separiĝis, kiam Mason estis ankoraŭ malgranda infano, kaj sekve la kvar fratoj (Ben, Hartley, Harry kaj la eta Mason) ekloĝis kun la patrino en la n-ro 18 de la strato Nelson en Briercliffe, Burnley. Ĉiuj eklaboris tre junaj en la lokaj teksejoj. Krome, la familio gastigis Joseph Stanworth, maljunan blindan onklon patrinflankan (GRO 1911).

Malgraŭ liaj malmultaj studoj, Mason ŝatis lerni lingvojn, kaj kiel adolto scipopvis ĉirkaŭ dek aŭ dek du.

Li estis vicprezidanto de la Laborpartio en la paroko Briercliffe, kaj ankaŭ li laboris kiel teksisto, precize en la firmao Frank Atkinson Ltd., situanta en la vilaĝo Harle Syke (BE 1952). Li edziĝis al Mary

Alice Stuttard (naskita Stead, el Preston, Lancashire, 19.03.1901–1999) en 1919, en tiam ekzistanta metodista kapelo en Burnley, kaj la sekvan jaron la paro ricevis filinon, Mae, kiu forpasis sesjara en marto 1927 (Lancashire OnLine Parish Clerks [rete]).

Jam en 1926 li gvidis Esperanto-kurson en sia urbo, kiel preparo por partoprenontoj de la tiujara Universala Kongreso en Edinburgo (*BE* 1926), kaj en 1927 li plej sukcese ekzameniĝis por ricevi diplomon de instruisto de Esperanto (*BE* 1927). Li vizitis la Universalan Kongreson en Antverpeno en 1928, kaj du jarojn poste li prelegis pri tio en sia urbo (*BE* 1930).

En 1936 la sidejo de la Internacia Esperanto-Ligo translokiĝis en la vilaĝon Heronsgate, en Rickmansworth (kiu plu estis la centra oficejo post la unuiĝo de tiu organizo kun UEA). Stuttard laboris tie kaj redaktis la revuon *Esperanto* (*BEN* 1954) en 1940–1947 kun C. C. Goldsmith kaj en 1947–1954 kun Hans Jakob (Steele 2005). En la revuo aperis liaj recenzoj de novaj publikaĵoj. De 1946 ĝis 1951 li vojaĝis kiel gastpreleganto en Nederlando, Belgio, Francio kaj Germanio (*CAT* 1958). Li estis unu el la kvar ricevintoj de la premio Buchanan de 1946–1947 (Tellier 2013).

Mason kaj lia edzino translokiĝis al Blackpool, kie li plu prelegis pri la internacia lingvo. En la registro de septembro 1939, simila al censo kaj uzita por krei identigajn kartojn kaj porci-kajerojn dum la mondmilito, la geedzoj kune kun la patrino de Mason aperas jam en tiu urbo, precize en la n-ro 79 de Marton Drive (*NR* 1939). Laŭ la sama fonto, Mason laboras kiel “ŝu-riparisto, ellaboristo, fakulo pri piedoj”, dum Mary Alice estas “dommastrino, nepagita”. En Blackpool ili ricevis filon: Roy, kiu naskiĝis en 07.01.1939 (*GRO* 1939) kaj forpasis nur trijara en 1943, en la ĉemara Poole, en Dorset (*GRO* 1943).

De 1951 Stuttard funkciis kiel konstanta kongresa sekretario de UEA, kio igis lin longe loĝi en la landoj, kie oni preparis Universalan Kongreson (dek monatojn laŭ *BEN* 1954), kaj kunveni kun gravaj politikistoj, kiel Vladimir Bakarić en Zagrebo, en 1952 (*Bildarchiv Austria* [rete]). Dum la Universala Kongreso en Bolonjo, en 1955, li kunordigis la teatro-revuon (Minnaja kaj Silber: 361, 589); tiun jaron li demisiis, kaj lian lokon okupis Gian Carlo Fighiera.

Stuttard abunde tradukis prozajn verkojn, interalie biografion de Tito (1954), en nur 32 tagoj; poste la mareŝalo akceptis lin kaj aliajn esperantistojn en la Blanka Palaco dum unuhora aŭdienco

(BEN 1954). Lia plej konata traduko estas *Morto de trajno* (1948). Tamen li famiĝis precipe dank' al la lernolibro por anglalingvanoj *The Esperanto Teacher*, plurfoje eldonita (Stuttard 1952). Li ankaŭ provlegis verkojn de aliaj aŭtoroj (Hernández 1953). Reveninte en Anglion, li laboris kiel asista komisiito de la Nacia Ŝparkaso, unue en la distrikto Bury kaj de 1958 en la distriktoj Blackburn kaj Burnley. Dum tiu tempo li dufoje parolis pri siaj vojaĝoj por la radiostacio BBC (Quis 1958, CAT 1958). Lia forpaso okazis la 1an de majo 1983 en Blackpool (GRO 1983, Pleadin 2006).

En 1946 aperis lia originalo *La virineto en bluo kaj aliaj rakontoj* (Stuttard 1946), en la kolekto Epoko de la eldonejo The Esperanto Publishing Co. Ĝi estis represita ĉe Artur E. Iltis en 1983, tuj post la forpaso de la aŭtoro.

Unu el ĝiaj dek tri rakontoj, “La kato en la sako”, reaperis en antologio redaktita de Vilmos Benczik, kiu ricevis la saman titolon (Benczik 1980). Ĝi temas pri tri junaj anglaj maristoj, kiuj provas kontrabandi skatolojn da cigaroj. Ĉe la elirejo de la dokoj policano volas kontroli la grandan sakon, kiun unu el ili kunportas. Tamen interne estas la kato de la ŝipo, kiu elsaltas kaj revenas al sia hejmo. Fine ankaŭ la maristo reiras al la ŝipo kaj ŝajnigas, ke li rekaptis la katon kaj ensakigis ĝin, sed verdire li kunportas la kontrabandatajn cigarojn. La policano iom kontraŭvole tralasas ilin. Nekonato sin proponas por veturigi ilin al stacidomo.

2. La ŝipo kiel heterotopio

La unua sceno de la rakonto okazas en kajuto, kie situas la tri junuloj. Elŝipiĝinte, ili ankoraŭ ne troviĝas plene en la ordinara socio, sed devas trairi mezan spacon, ankaŭ kun apartaj trajtoj: la dokon. En ĝi forestas hom- kaj aŭto-svarmo, kaj ajna ornamaĵo – temas pri areo kun tre specifa celo, kiu unuflanke baras al la ŝipanoj la eliradon en la normalan mondon, kaj aliflanke preparas ilin por la surteraj homaj aktivaĵoj. Fine de la rakonto la tri roluloj envenas en la urbon kaj enaŭtiĝas. Tamen kio aparta permesas, ke ili konduku laŭplaĉe, senĝene en la ŝipo? Por Foucault (1994) ŝipoj estas la ĉefa *heterotopio*, nome spaco kun aliaj, propraj reguloj. Pri la ŝipoj li asertas:

[...] ŝipo estas flosanta spacero, senloka loko, vivanta per si mem, enfermita, kaj samtempe aperta al la mara infinito, kiu de haveno al haveno, de bordo al bordo, de bordelo al bordelo iras al kolonioj por serĉi la plej valorajn trezorojn el iliaj ĝardenoj, jen vi scias kial ŝipo estis por nia civilizo, de la 16a jc. ĝis hodiaŭ, samtempe ne nur la plej granda ekonomia disvolvilo (ne pri tio mi parolas hodiaŭ), sed la plej granda imag-rezervujo.

Foucault listigis regulojn proprajn al heterotopioj. La tria regulo estas ilia kapablo kunmeti, en unu saman spacan, aliajn spacojn reciproke nekunigeblajn. La kajuto en la rakonto ebligas al la tri viroj kondukti laŭ kontraŭnormaj reguloj, ne nur per la kontrabandataj varoj, sed ankaŭ per siaj malstrikta sintenoj kaj kondutoj. Temas pri spaco, kie la tempo tranĉiĝas aŭ, pli bone, nuliĝas (kvara regulo), kvazaŭ ili restus por ĉiam junaj kaj blondaj en sia juvelujo. Tuj ĉe la komenco estas la sola indiko pri la tempo en tiu parto de la rakonto; ĝi montriĝas svaga, ampleksa: "Dum longa tempo regis en la kajuto tomba silento". Cetere, la kajuto estas enfermita loko ene de pli granda, ankaŭ fermita spaco (ĉar izolita en la maro): la ŝipo. Kaj ŝipo, same kiel insulo, estas memstara komunumo, sed ankaŭ ekstermonda spaco por alieco (Del Valle 2014). Fine, laŭ la kvina regulo, la prezentita spaco, kie kunestas la tri junuloj, estas kompensa heterotopio; la ŝipo (kaj la kajuto en ĝi) ebligas la kreon de aparta mondo, kie ne regas la subpremaj reguloj de ekstero, kaj tial ĝi fariĝas kritiko de la ordinara mondo, de ties malperfekteco kaj hipokrito. Alivorte, en la rakonto de Stutard funkcias la sama mekanismo, kiun Doron (2016) priskribis por la romano *Billy Budd* de Herman Melville:

ĉar traocanaj ŝipoj estis tute aŭtonomaj aferoj kaj ne estis plene regitaj de la viktoriaj sociaj normoj, la limigita spaco sur ŝipo ofte akceptas tolerajn sintenojn rilate samseksamajn dezirojn kaj sekskuniĝon inter maristoj.

3. Maristoj kaj muskoloj kiel geaj ikonoj

Post mallonga enkonduko la rakontanto priskribas la tri ĉefrolulojn, ĉiun per aparta paragrafo. La maristoj estas esence similaj laŭ trajtoj kaj sinteno. Tiu eksterordinare longa spaco dediĉita al la aspekto kaj dispozicio de la korpoj de la protagonistoj aperas en mallonga rakonto, subĝenro, en kiu priskriboj estas multe malpli gravaj ol la elmontrataj agoj aŭ okazaĵoj. Tamen jam en la komenco prezentiĝas la ŝlosilo por interpreti la tekston, kaj por pli granda efiko, la nomoj de la protagonistoj ankoraŭ ne estas menciitaj, kun la celo eviti negravajn informojn, kiuj povus distri la leganton. La tuta atento centriĝas sur la korpoj kaj iliaj teniĝoj. Tiuj estas klare markitaj de seksa karaktero; la unua maristo aperas diskurre sidanta sur seĝo, la dua kuŝas sur lito, kaj la tria balanciĝas per movo kopul-simila: “La seĝo estis malantaŭen ŝovita tiel ke ĝi staris sur la du malantaŭaj piedoj, kaj la junulo sin svingis tien kaj reen per simpla fleksado kaj malfleksado de la genuoj”. La samtempe streĉan kaj serenatan atmosferon montras la aserto, ke “Ŝajnis iafoje, ke li tute renversiĝos; tamen per bela kalkulo de distanco li ĉiufoje sukcesis teni sian ekvilibron”. Krome, ĉiuj tri estas en negliĝo, kio substrekas la erotan karakteron de la sceno.

Ne nur la “kalkulo de distanco” estas “bela”, sed ankaŭ la maristoj mem. Pri la unua rakontanto diras al ni, ke “Li estis maldika, tamen grandosta, kaj kredeble altstatura ĉar li havis tre longajn kruojn. Lia vizaĝo estis lentughava kaj super ĝi abundis fajre ruĝaj haroj”. La dua montriĝas tiel: “Li havis brunajn bukajn harojn kaj malgrasan vizaĝon, kiu bruniĝis de suno kaj vento. [...] la muskoloj de la nudaj brakoj elstaris, montrante la latentan forton, kiu tie sidas”. Laste, pri la tria maristo ni legas: “Li havis plaĉan vizaĝon, rondan, ruĝetan, kaj bluajn okulojn. Liaj blondaj haroj estas zorge brositaj”. La tri junuloj aspektas allogaj kaj fortikaj, kaj poste elŝipiĝas “nete vestitaj, kun ŝuoj spegulece brilaj kaj kun ĉapeloj malantaŭen ŝovitaj sur la kapoj”. Antaŭ la leganto sternaĝas panoramo de hipermaskla loko, kie tri junaj viroj montriĝas per erotizitaj korpoj.

La mito de la samseksama maristo (ofte ankaŭ muskola) estas forte enradikiĝinta en la geja kulturo. En Usono tiu elemento finkonturiĝis danke al la apero en 1952 de la revuo *Physique Pictorial* de la losanĝelesa fotisto Bob Mizer. Krome, en 1952 aperis en Ĉikago simila, kvankam malpli pretenda revuo: *Tomorrow's Man*.

La temo estis ankaŭ traktita de pentristoj kaj desegnistoj, kies verkoj videblis en la paĝoj de la revuo: Spartacus, Etienne k.a. (Taschen, 1997). Artistoj kiel Nichol (Tom Nicholl) abunde fotis fortikajn maristojn en magra vestoprovizo, kaj unu el la plej konataj gej-erotaj desegnistoj, Tom of Finland (Touko Laaksonen, 1920–1991), vaste kontribuis al la disvastigo de la mito de la muskola, seksopreta maristo kun striktaj vestoj kaj ŝvelaj cicoj (Hooven, III, 2002).

La mito internaciĝis en la okcidenta geja kulturo laŭlonge de la sekvaj jardekoj kaj daŭris ĝis hodiaŭ. Ekde la sepdekaj jaroj la fotistoj Pierre et Gilles elektis ĝin kiel sian ĉefan temon, same kiel la desegnisto kaj parfumisto Jean-Paul Gaultier (aparte influaj estas liaj reklamoj pri la parfumo *Le Mâle*, de 1995 ĝis nun). Lige kun tio Tran (2013) substrekas, ke pluraj aŭtoroj mencias la signifan rolon de la marista mito en la geja ikonografio. Allan Berube, citita de Burton kaj Harding (2013), asertas, ke en la geja komunumo maristoj havas la reputacion, ke ili estas plej alireblaj kaj malfermaj al pli vasta gamo da seksaj aktivajoj kaj spertoj. Tiaspecaj modelaj ikonoj masklaj, kiel la maristo, estas tradicie asociitaj al aliseksamo kaj senas je la stigmato ligita kun *inecaj gejoj*; per ilia ekzisto, vera rezistejo, la nocioj pri malsupereco de gejoj kaj samtempa *heteronorma*¹ supero de aliseksamuloj estas defiatataj, re-alproprigataj aŭ eĉ renversataj (Sonnekus 2009).

Ekzistas antaŭaj ekzemploj de la sama tradicio en literaturo, ekzemple la supre menciita *Billy Budd, maristo* (*Billy Budd, Sailor*, 1924) de Herman Melville, sur kiu baziĝis *Querelle el Brest* (*Querelle de Brest*, 1947) de Jean Genet. Ĉi lasta romano inspiris la filmon *Querelle* (1982) de Rainer Werner Fassbinder, kiu baldaŭ post ĝia apero fariĝis kulto-verko por la geja kulturo. Kiel precedenco menciindas i.a. la romano *La bona kreolo* (*Bom-crioulo*, 1895) de la brazilano Adolfo Caminha.

Tamen la protagonistoj de “La virineto en bluo” estas *nova specio* de maristoj, aperinta post la dua mondmilito: “Jen bela maniero trakti tiun, kiu servas la patrolandon”, defie asertas unu el ili al la policisto. Nenio peka aŭ kulpa troveblas en ili, kaj ili fiere paradas sur la kajo. Ili ne submetiĝas al la leĝoj, sed intence ignoras ilin; tiel la sukcesa supero de la polica kontrolo estas metaforo de iliaj personoj; ne nur tabako, sed ankaŭ iliaj vivoj estas kontrabanditaj,

1 Aliseksamisma.

defiante la ŝtatan subpreman politikon, kiu en Britio ĝis 1967 ne laŭleĝigis samseksajn seksrilatojn.

Kune kun kelkaj trajtoj tradicie atribuitaj al virinoj (kaj neniel al maristoj: “liaj longaj haroj estis zorge brositaj”) kaj tial agantaj kontrapunkte, la tri ĉefroluloj montriĝas al ni kun muskolaj korpoj, harditaj en ŝiplaboroj. Jam en 1891, en la portugala romano *O Barão de Lavos* (*La Barono de Lavos*) de Abel Botelho, unu el la samseksamaj protagonistoj postsekvas “virojn muskolajn kaj fortajn, korpostrukturojn fortikajn kaj povoplenajn, kiel maristoj, militistoj kaj kaleŝistoj” (Botelho 1898, la traduko estas mia). Ekzercita, muskola korpo, montras deziron triumfi en sekso kaj sano (Llamas kaj Vidarte 2000: 59), kio estas aparte signifa en postmilita kunteksto, kiel tiu de “La kato en la sako”. Aliflanke, meze de la pasinta jarcento, kiam Stuttard verkis la novelon, muskola korpo ne plu montris apartenon al la laborista socia klaso. Sporto estis jam sufiĉe disvolviĝinta, kaj post la milito ekzercado, kie muskola hipertrofio ludis ĉefan rolon, komencis etendiĝi: en 1940 okazis en Usono la unua moderna korpokulturista konkurado, “Mr. America”, kaj en 1950 NABBA (Nacia Amatora Korpokulturista Asocio) fondiĝis en Britio (Robson 2014). Do libera de sociklasaj konotacioj, kaj sine de socio serĉanta ekonomian prosperon, muskol-disvolviĝo povis plifortigi siajn asociojn en la kampo de la vira belo.

Grandaj muskoloj povas kaŝi minoritatajn seksaltirojn. Kiel simbolo de vireco, ili povas esti supozon pri aliseksamo (Llamas kaj Vidarte 2000: 65). Tamen en “La kato en la sako” ni renkontas tri junajn virojn, kiuj, post longa marvojaĝo, aperas en malstreĉaj teniĝoj kaj, kontraŭ espereblaj konjektoj, ne montras ajnan emon al virinoj. Fakte, virinoj aŭ aludoj al ili tute forestas en la rakonto. La sola intereso de la tri protagonistoj estas transpasi la alinormajn, heterotopiajn ŝipon kaj kajon kaj aliri la *ordinaran* mondon.

4. Cigaroj, cigaredoj

Fumado ludas gravan rolon laŭlonge de la tuta rakonto. Tamen la uzo de cigaroj aŭ cigaredoj, efektiva aŭ proponita, aperas nur en la komenco kaj en la fino, kaj tio donas rondan karakteron al la teksto. Kvankam de la 19a jc. oni asocias al tabako konceptojn kiel efemereco de plezuro kaj de la vivo, ĝi pli kaj pli montriĝis kiel seksa metaforo, en kiu la cigar(ed)o egalas penison (Rodríguez Díaz

2012). Kaj kvankam ne ĉiam tiu simbola asocio estas konstatebla, ĉar simboloj akiras signifon laŭ la kunteksto, en kiu ili estas uzataj, en la rakonto de ĉi studo cigar(ed)oj montriĝas kiel projekcio de korpoparto de la maristoj sur objektoj de la mondo (Barry 2001), aŭ, per metonimio, de iliaj sekse markitaj korpoj.

“Tabakfumo ŝvebis ĉie” estas la dua frazo de la rakonto. Nur pri la du unuaj maristoj la rakontanto diras, ke ili fumas cigaredojn. La kontakto kun lipoj estas dufoje montrita, aldonante plian elementon kun erotika nuanco: “Li tenis la cigaredon inter la lipoj kaj nerve ĝin rulis de unu buŝangulo al la alia, intertempe elblovante la fumon tra la naztruoj” kaj “La cigaredo de tiu junulo sur la kuŝejo forbrulis ĝis la lipoj”.

Kiam leviĝas la problemo, kiel eliri el la ŝipa heterotopio kaj el ĝia etendiĝo (la dokejo, kie policistoj “priserĉas ĉiun eliranton”), la diskuto de la roluloj verdire temas pri ilia aliro al la postmilita mondo kiel individuoj sekse markitaj, kun seksa orientiĝo kontraŭa al la *heteronorma* ordo. Alivorte, ili provas supervivi kiel minacita specio en alia ekosistemo (Llamas kaj Vidarte 2000: 25). La trompo al la leĝo, metonimita de policano, okazas danke al artifiko: la tri roluloj, anstataŭ iliaj ŝatataj cigaroj (kiuj ne plu estas la etaj cigaredoj de la komenco, do la simbolo submetiĝas al gradacio), prezentas katon, kiu en pluraj lingvoj (ankaŭ en la angla, kiun ili supozeble parolas: *pussy*) simbolas vulvon. La kato-vulvo, prezentita kiel falsa atestilo pri konformeco de la maristoj kun la ekstera socio, ebligas al ili transiri la pordegon.

Se konsideri ĉion ĝis nun diritan, la lasta paragrafo entenas seksan proponon al la nekonato, kiu bonvole helpis ilin kaj veturigis for de la dokoj: “Sinjoro, mi ne konas vin, sed vi estas bonegulo. Mi tre dankas vin. Ĉu vi prenos cigaron?” Laŭ legado sub *koira* prismo, evidentiĝas reciproka rekono (kiel apartenantoj al grupo de *disidentaj* seksaj orientiĝoj) inter la tri maristoj kaj la nekonato, kies helpo probable ne estas seninteresa.

5. Konkludoj

Same kiel la apero de ĵargono, privata lingvaĵo por interkompreniĝo inter gejoj, kapabla transdoni realaĵojn, situaciojn, viverojn sen la sarkasmo kaj primoko de la *heteronorma* socio (Llamas kaj

Vidarte 2000: 76), ankaŭ en literaturo troveblas ekzemploj de kodado destinita al interpretado de geja legantaro, tiel ebligante duan legadon. La rakonto “La kato en la sako” sin turnas al viraj geaj legantoj per diversaj strategioj: erotigo de la vira korpo, kiu sin elmontras en seksaj teniĝoj kaj en situacioj kaj kunteksto, kie virinoj forestas; la uzo de geja ikonografio, precize de maristoj; kaj tiu de geje kodita polisemio, kiu malfermas la tekston al pluraj interpretoj, kaj por inicitoj kaj por la ĝenerala publiko (Tran 2013). Tiu aparta maniero prezenti tekston, kiu cetere devas sin teni kohera, t.e. en ĝi la diversaj elementoj devas rilati al la ceteraj, al la kunteksto, por ricevi sian signifon, konsistigas embrion de tio, kiun Genette (1972) nomis *politika rakontado*. Temas pri la formulado, multfoje en implicita formo, de kolektivaj idealoj, ĉi-kaze de la naskiĝanta politika konscio de la geja komunumo, kiu fine kristaliĝis en la 70aj jaroj.

Bibliografio:

- Barry, Virginia C. 2001: Freud and Symbolism: Or How a Cigar Became More Than Just a Cigar. En: Winer, Jerome A. kaj Anderson, James W. (ed.): *The Annual of Psychoanalysis, v. 29: Sigmund Freud and His Impact on the Modern World*. Hillsdale / London: The Analytic Press. 51-65.
- BE 1926: *Burnley Express*, 17an de aprilo 1926. 2.
- 1927: Examination success. En: *Burnley Express*, 17an de septembro 1927. 7.
- 1930: *Burnley Express*, 15an de februaro 1930. 8.
- 1952: From Harle Syke to world capitals. En: *Burnley Express*, 3an de decembro 1952. 5.
- BEN 1954: Ex-weaver is a leader of world’s Esperantists. Back in visit to home-town. En: *Burnley Express and News*, 11an de septembro 1954. 3.
- Benczik (red) 1980: *La kato en la sako*. Budapest: Tankönyvkiadó. 48-57
- Bildarchiv Austria* http://www.bildarchivaustria.at/Pages/ImageDetail.aspx?p_iBildID=12885101
- Botelho, Abel 1898: *O Barão de Lavos*. Porto: Livraria Chardon. 493.

- Lancashire OnLine Parish Clerks: *Burials at Wheatley Lane Inghamite in the Parish of Fence in Pendle. Burials recorded in the register for 1911-2002. Burials for 1927-1942.* En: www.lan-opc.org.uk/Fence-in-Pendle/inghamite/burials_1927-1942.html
- Burton, Emily, kaj Harding, Bob 2013: *Hello Sailor! Canada: Gay, Lesbian and Transgendered Seafarers.* Province of Nova Scotia, Maritime Museum of the Atlantic. 6.
- CAT 1958: Author who met Tito is new savings chief. En: *Clitheroe Advertiser & Times*, la 10an de Oktobro 1958. 3.
- Del Valle, Luis A 2014: A través del gran límite. Heterotopias urbanas, cine y literatura . En: *Anales del IAA*, vol. 44, n-ro 1. Buenos Aires: Universidad de Buenos Aires. Legebla ankaŭ en: <http://www.iaa.fadu.uba.ar/ojs/index.php/anales/article/download/131/119>.
- Doron, Itai 2016: Tinker, soldier, sailor, thief: The visual representations and appropriations of the male sexual outlaw as a gay fantasy figure in the Arts and in fashion imagery. En: *Critical Studies in Men's Fashion*, 3 (2). 79-93. Ankaŭ legebla en: <http://ualresearchonline.arts.ac.uk/10375/>
- Foucault, Michel 1994: Des espaces autres. En: *Dits et écrits. 1954-1988. IV, 1980-1988.* Paris: Gallimard. 752-762.
- Genette, Gérard 1972: *La escritura liberadora: lo verosímil en la "Jerusalén Liberada" del Tasso.* Kolekto Comunicaciones. Bonaero: Tiempo Contemporáneo. 2a eld. 33.
- General Register Office [GRO] 1911: *Census of England and Wales, 1911.* Briercliffe, Burnley. Formulario n-ro 42.
- 1949: *Births Registered in January, February and March, 1939.* 372.
- 1943: *Deaths Registered in October, November and December, 1943.* 361.
- 1983: *Deaths Registered in April May June 1983.* 832
- Hernández, Luis 1953: Ricevitaj libroj. La alaska stafeto kaj Kaptitoj de la Glacirokoj. En: *Boletín.* Jaro VI, n-ro 54, junio 1953. 495
- Hooven, III, F. Valentine 2002: *Beefcake. The Muscle Magazines of America 1950-1970.* Köln: Taschen.
- Llamas, Ricardo, kaj Vidarte, Francisco Javier 2000: *Homografías.* Madrid: Espasa Calpe.
- Mason Stuttard, en: *Bonvenon al la Biblioteko Butler* <https://biblbut.wordpress.com/kio-estas-kie/la-britaj-esperantistoj/mason-stuttard/>

- Minnaja, Carlo, kaj Silfer, Giorgio 2015: *Historio de la esperanta literaturo*. La Chaux-de-Fonds: lf-koop.
- National Register [NR] 1939: Registration District and Sub-district 477-2, formularo n-ro 2.
- Pleadin, Josip 2006: Stuttard, Mason. En: *Ordeno de Verda Plumo. Leksikono pri Esperantlingvaj Verkistoj*. Ĵurĉevac: Grafokom. 219.
- Quis 1958: In and Out and Round About. En: *Clitheroe Advertiser & Times*, 21an de oktobro 1958. 2.
- Robson, David: A History Lesson in Bodybuilding. En: www.bodybuilding.com/fun/drobson61.htm.
- Rodríguez Díaz, Susana 2012: El tabaco como símbolo de placer y peligro: de la publicidad atrayente a la propaganda disuasoria. En: *Intersticios. Revista sociológica de pensamiento crítico*, vol. 6 (2). www.intersticios.es/article/view/10443/
- Sonnekus, Theo 2009: Macho men and the queer imaginary: A critique of selected gay 'colonial' representations of homomascularity. En: *de arte*, n-ro 80, 37-53.
- Steele, Katarína 2005: Pri nia revuo kun ĝia redaktoro. En: *Esperanto* 1182 (6) junio. 129.
- Stuttard, Mason 1946: *La virineto en bluo kaj aliaj rakontoj*. Heronsgate: The Esperanto Publishing Co.
- 1952: *The Esperanto Teacher. A Text-book of the International Language with Special Emphasis on the Needs of the Non-Grammarian and Student*. Edinburgh / London: Thomas Nelson and Sons, Ltd.
- Taschen (eldonejo) 1997: *Some male nudes. 30 postcards*. Köln: Taschen.
- Tellier, Angela 2013: Dr John Buchanan: an Esperanto legacy to the University of Liverpool. En: www.esperantoresearch.org.uk/sites/
- Tran, Brian 2013: *The Visual Semiotics of Fragrance Branding: Exploring Jean Paul Gaultier's "Le Male"*. [Magistriĝa referaĵo]. Toronto: Ryerson University.